# EL LA KANTONMENTO.

Ekde la komenco de la mobilizo la Esperanto-movado en nia bataljono bone disvastiĝis. Kun fiereco mi povas vidi, kiel nun multaj militistoj interesiĝas pri nia katolika Esperantomovado. Estas granda ĝojo por ni, dum la liberaj horoj laŭeble okazigi kelkajn lecionojn, kaj estas kuraĝige por mi konstati, ke ĉiuj bone progresas. Post kelke da tempo kelkaj el nia grupo esperas aboni Flandra Katoliko'n, de kio jam la unua donis la ekzemplon.

En la nomo de ĉiuj mi deziras esprimi en Flandra Katoliko, nian plej koran dankon al la direkcioj de la magazenoj Vaxelair-Claes el Antverpeno, la sigarfabrikojn « Romano » en Geel, la firmaon Corstiaens en Antverpeno kaj precipe la « Unuigitaj Teksejoj » en St. Niklaas-Waas, kiuj ĉiuj per sendado de utilaj objektoj malavare helpis nin en tiuj ĉi malfacilaj cirkonstancoj kaj malvarmaj vintromonatoj.

Ni esperu, ke multaj el niaj mobilizitoj utile uzos sian liberan tempon, anstataŭ enui kaj ke ili komprenos, ke oni neniam pensu esti atinginta sian celon, sed ke ĉiam restas ankoraŭ pligranda, pli nobla celo atinginda.

Mi esperas, ke ankaŭ la geamikoj hejme daŭrigas la laboron por nia bela idealo. Se ni havas fortan volon, la estonteco estos nia, ĉar forta volo povas movi montojn!

Vivu Esperanto, for la batalilojn!

C. Tousseyn.

El Flandra Katoliko 1940-3